

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 23.5.2012

Profesoro Venceslao *Dyk*, la parazitologo

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 23-an de majo 2012

La 29-an de februaro 2012 mi partoprenis en seminario pri profesoro Venceslao *Dyk* [dik] en Instituto de Bestkuracista Historio de la Universitato de Bestkuracista kaj Farmacia Sciencoj en *Brno*. La profesoro estis eminenta iĥtiologo, parazitologo, universita pedagogo kaj elstarulo de urbo *Brno* (ŠINDLÁŘ 2012).

Venceslao *Dyk* naskiĝis la 28-an de februaro 1912 en urbeto *Strakonice* [strakonjice] en suda Bohemio. Familio *Dyk* devenis el Nederlando, tial familia nomo origine estis *van Dyck*, sed en Bohemio tiu nomo estis skribita kiel *Dik*, *Dík* kaj *Dyk*. Patro de Venceslao *Dyk* estis muelisto. Fiŝkaptado kaj ĉasado apartenis al familiaj tradicioj. Venceslao frekventis elementan lernejon en *Strakonice* en la jaroj 1918-1923. Li interesiĝis pri naturo. La unuan forelon li kaptis jam kiel sesjara knabo. La forelo fariĝis lia ŝatata fiŝa specio. Mezlernejon li frekventis en *Strakonice* kaj *Tábor* [ta:bor] en la jaroj 1923-1931. Tie li laboris en studenta naturscienca rondeto.

La 1-an de oktobro 1931 V. *Dyk* ekfrekventis sian studadon en la Bestkuracista Universitato en *Brno*. Profesoro *Oldřich Vilém Hykeš* [oldrjĥ vile:m hikeŝ], kiu esploris influojn de mambestaj hormonoj al senvertebruloj, nutraĵon de akvaj bestoj kaj influojn de toksinoj al bestoj, tre influis talentitan studenton, kiu en *Brno* proksimiĝis ankaŭ kun fama verkisto kaj poeto *Jiří Mahen* [jirji: mahen], aŭtoro de *Rybářská knížka* (Fiŝkaptista libreto). Studento *Dyk* publikigis sian unuan sciencajn artikolon jam en la jaro 1934. En tiu artikolo li, post multe da eksperimentoj kun vivantaj fiŝoj en akvarioj, klarigis, ke frostita viando ne estas bona nutraĵo por artefarite bredataj fiŝoj, sed seka viando kun ovoflavo povas esti anstataŭa nutraĵo. Studento *Dyk* estis tre laborema kaj jam dum sia studado publikigis ĉirkaŭ 120 artikolojn. Dum siaj feriadoj li fiŝkaptis en Slovakio, kie li unufoje ekrigardis danuban salmon (*Hucho hucho*) kaj ekinteresiĝis pri protektado de tiu granda kaj belega raba fiŝo.

La 22-an de februaro 1938 *Dyk* sukcese finigis sian studadon en la universitato. Li ne volis tie labori, ĉar salajroj ne estis bonaj, sed li trovis laborlokon nek en *Třeboň* [trjebonj] nek en Uĥhorodo. Poste li fariĝis asistanto en Biologa instituto de la Universitato kun salajro 880 kronoj. En sia doktora disertaĵo li komparis nutraĵon de forelo kaj timalo, kiuj troviĝas komune en la samaj rojoj kaj riveroj. *Dyk* klarigis, ke foreloj kaj timaloj ne estas konkurantoj, kvankam ili renkontiĝas en la sama biotopo, ĉar la forelo voregas insektojn kaj fiŝetojn sub akvosurfaco, dum la timalo kaptas precipe malgrandan insekton de fundo.

Li sukcese esploris surfacajn parazitajn de fiŝoj. Ĉeĥoj uzadas popoldiron „sana kiel fiŝo“, sed laŭ realo la fiŝoj, simboloj de sano, suferas de multe da virusaj, bakteriaj, fungaj kaj parazitaj malsanoj. *Dyk* faris multe da eksperimentoj, ekz. kun foreloj kaj karasoj. En kelo de lia laborloko estis multe da akvarioj, aliajn eksperimentojn kaj observadojn *Dyk* faris en kampo. Kelkajn parazitajn li trovis sur kaj en fiŝoj, kiujn li kaptis.

La 18-an de septembro 1938 V. *Dyk* edziĝis al *Silvia Kučerová* [kuĉerova:], inĝenierino de arĥitekturo. Ŝi naskiĝis en la jaro 1910 en *Přerov* [prjerov] kaj interesiĝis

pri sportoj, precipe pri skermado, skiado, teniso, turistiko, montgrimpado kaj sketado. V. Dyk ne partoprenis en mobilizado kontraŭ nazioj, ĉar li post danĝera malsano en sia infaneco ne estis kapabla servi en ĉeĥoslovaka armeo. *Silvia Dyková* [dikova:] ne povis trovi laborlokon kaj tial ŝi ekhelpis al sia edzo kiel ilustratorino de liaj libroj, skriptoj kaj prelegoj. Post edziĝo novgeedzoj translokiĝis al gepatroj de S. Dyková en straton *Tučkova* [tuĉkova] numero 7 en *Brno*, kie ili loĝis ĝis februaro de la jaro 1940. En tiu jaro V. Dyk ekprelegis pri patologio de ĉasbestoj en Agrokultura Universitato en *Brno*. Sed post la 17-an de novembro 1939, kiam germanaj nazioj fermigis ĉiujn universitatojn, li ne devis prelegi en iu ajn universitato. La 27-an de januaro 1940 V. Dyk adiaŭis kun fiŝbredantoj de *Brno* kaj en sia prelego rekomendis por valbaraĵo de *Knínice* [knji:njice] (nuntempa valbaraĵo de *Brno*) bredadon de leŭciskoj, ezokoj, lucioperkoj, tinkoj, barboj, bramoj kaj karpoj. Li ne rekomendis bredadon de perkoj kaj siluroj, kiuj voregas multe da valoraj valbaraĵaj fiŝoj.

En la jaroj 1940-1946 V. Dyk laboris en Fiŝkultura kaj Hidrobiologa Esplorstacio en *Vodňany* [vodnjany] en suda Bohemio. En septembro 1940 naskiĝis lia filino *Jana* kaj en decembro 1943 filino *Iva*. Jam en la jaro 1940 V. Dyk fondis en *Vodňany* eldonejon de fiŝkulturista beletrio *Pramen* (Fonto). Lia unua signifa libro „*Naše ryby*“ („Niaj fiŝoj“) estis eldonita en la jaro 1944. V. Dyk interesiĝis pri akva molusko margaritifero, kiu kapablas krei perlojn. Post la dua mondmilito V. Dyk partoprenis en vakcinado de porkoj kontraŭ ruziopatio. Por tiu laboro li ricevis sian unuan aŭtomobilon, konfiskitan germanan *Opel Olympia*, eĉ kun saharaj kontraŭsablaĵaj aerfiltoj, verŝajne eksa veturilo de germana afrika armeo de marŝalo *Erwin Rommel*. En la jaroj 1946-1948 V. Dyk laboris en Agrokultura Esplorstacio en silezia urbo *Opava*. Li esperis, ke post iu tempo li eklaboros denove en la universitato, kiun li devis forlasi antaŭ okupacio. En Silezio V. Dyk helpis al evoluo de esplorado de fiŝaj malsanoj kaj fiŝbredado. Li sciis, ke niaj fiŝlagoj, riveroj kaj rojoj kapablas doni grandan riĉaĵon al bonaj mastrumantoj, sed dum la milito ili estis malbone primastruitaj. Dum la milito soldatoj de ĉiuj armeoj „kaptis“ fiŝojn uzante mangrenadoj kaj multe da homoj ŝtelfiŝkaptis. Tasko de fiŝbredantoj estis renovigi fiŝajn populaciojn en fiŝlagoj, riveroj kaj rojoj, kiuj estis priŝteladitaj dum la mondmilito. Sed la plej signifa problemo de tiu industria regiono estis poluado de akvaj fontoj de ĥemiaĵoj kaj industriaj balaĵoj. Familio de Dyk trovis loĝejon en *Ostrava-Poruba* (Strato de *Lenin*, nuntempa strato *Hlavní*, numero 70), kie la 27-an de decembro 1946 naskiĝis filo *Petr*. V. Dyk publikigis multe da artikoloj pri fiŝoj, ne nur fakaj, sed ankaŭ popularaj, en ĵurnaloj *Rybář* (Fiŝkaptisto), *Československý rybář* (Ĉeĥoslovaka fiŝkaptisto), *Chvilky v přírodě* (Momentoj en naturpejzaĵo), *Akvaristické listy* (Akvariista ĵurnalo) k.a. Li revenis al rezultoj de siaj sudbohemiaj esploroj de margaritifero kaj en la jaro 1947 publikis libron „*Česká perla*“ („Bohemia perlo“), kie li akcentis necesecon de protektado de tiu akva molusko.

V. Dyk preparis ankaŭ manuskripton de populara libro por junularo „*Z pokladnice naší přírody*“ („El trezorejo de nia naturo“) en la jaro 1947, sed eldono estis flankenmetita kaj en la jaro 1948 nova eldonejo *Státní nakladatelství dětské knihy* rifuzis la manuskripton, ĉar teksto simila al stilo de usonano *Ernest Thompson Setton* [ernst tompsn si:tn], kiu instruis junularon skoltamane, ĉeĥoslovakaj ne plaĉis al komunistoj, kiuj klopodis edukadi junularon por socialismo.

En la jaro 1948 V. Dyk revenis en la universitaton, kie ekgvidis Instituton de universala biologio kaj parazitologio (**Bildoj 1 kaj 2**). Li klopodis renovigi laborlokon kaj frue faris eksperimentojn kun vivantaj fiŝoj. Lia taskoj estis organizado de instruado de studentoj kaj verki lernolibrojn (DYK 1965, DYK k.a.1957, KRATOCHVÍL 1972). Aŭtune en la jaro 1948 lia familio translokiĝis en domo numero 16 en strato *Hroznová* en *Brno*.

La 26-an de februaro 1948 V. Dyk docenteciĝis. Lia prelego nomiĝis „*Koloběh látkový v přírodě, zvláště ve vodě*“ („Cirkulado de materio en naturo, precipe en akvo“).

V. Dyk estis tute apolitika sciencisto. Li aliĝis al Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio enkadre de varbado, kiun komunistoj organizis en la jaro 1948, ĉar li volis protekti sian familion (kun tri infanoj), sed frue suferis unuajn cikatrojn de konflikto kun nova reĝimo. Komunistoj observis lian laboron kaj konduton. En komunistaj raportoj de tiu tempo ofte aperadis plendoj kontraŭ V. Dyk, ke li estas nur pasiva komunisto, kiu alteniĝas al sia familio, dediĉas al sia familio ĉian liberan tempon, ne volas aktive partoprenadi en ideologa lernado kaj ne respektas sovetajn sciencistojn. Tiuj sovetaj sciencistoj, kiuj laŭ komunistoj estis admirindaj, estis *Trofim Denisoviĉ Lysenko* [denjisoviĉ lisenko] (1898 – 1976)



kaj *Olga Borisovna Lepešinskaja* [lepešinskaja] (1871 – 1963). En tiu tempo kelkaj niaj sciencistoj nekritike admiris soveta sciencon kaj rifuzis mendelan genetikon. *Lysenko* estis soveta agronomo de ukraina deveno, kiu esploris evoluon de plantoj kaj alkondukis metodojn de jarovizo (vernalizo) de cerealoj. Sed li rifuzis mendelan genetikon kaj volis krei novajn speciojn de bestoj kaj plantoj uzante influon de vivmedio. Li ekzemple volis transformi kverkon al karpino. Liaj eksperimentoj kun frue naskiĝintaj bovidoj, kiuj estis enmetitaj en specialaj lignaj budoj de Ŝtajnman en 40-grada frosto de rusa vintro, por ke fariĝu hardita bova raso, estis nur sensenca krueleco kontraŭ mizeraj bestoj, kiuj fariĝis viktimoj de ĉarlatano.

Lepešinskaja estis bona amikino de soveta diktatoro *Stalin*. Ŝi faris eksperimentojn kun materio, ĉar ŝi volis krei vivantajn organismojn de nevivanta materio. Por tiuj eksperimentoj ŝi uzis hidredojn, akvajn bestoj, kiuj havas ekstreman kapablecon de regenerado. Ŝi dispistis la hidredojn en sablo kaj montris al ĉiuj „nevivantan materion“ (kiu enhavis vivantajn ĉelojn de la hidredoj). Post iu tempo en la „nevivanta materio“ aperis vivaj organismoj. Tiu ĉarlatanaĵo diskreditis soveta sciencon.



V. Dyk estis iomete naiva rusofilo, sed kiel sciencisto li rifuzis sensencojn de *Lysenko* kaj *Lepešinskaja*. Tial li estis persekvata. Komunistoj decidis, ke li ne devas plu prelegi biologion en la universitato kaj li ne devis profesoriĝi. En la jaro 1951 komunistoj el katedro de parazitologio elsplitis instituton de biologio. Ili ne volis permesi al *Dyk* instrui biologion, ĉar li ne estis „bona komunisto“. Ideologoj venkis fakulon.

V. Dyk renovigis fakĵurnalon de la universitato eldonante ĝin sub nomo *Spisy Vysoké školy veterinární* (Verkaro de la Bestkuracista Universitato) (DYK & ŠINDLÁŘ 1972). Jam en la jaro 1949 li organizis studentan rondeton de iĥtologio kaj parazitologio. V. Dyk havis multe da kontaktoj kun bohemiaj, sileziaj kaj slovakaj fiŝbredantoj. Li eklaboris kun *Rybářský spolek Jiřího Mahena* (Fiŝkaptista asocio de *Jiří Mahen*) en *Brno*, akvariista societo *Cyperus* kaj multe da aliaj organizoj. Lia edzino ilustris liajn lernolibrojn.

En la jaro 1952 V. Dyk eldonis sian signifan monografion „*Nemoci našich ryb*“ („Malsanoj de niaj fiŝoj“).

Dyk estis pasia fiŝkaptisto kaj ĉasisto. El fiŝoj kaj bestoj li akiris parazitojn por siaj esploroj. Jam kiel studento li admiris rusan kaj sovetan biologon kaj parazitologon *Valentin Aleksandroviĉ Dogel* (1882 – 1955) [valentjin], kiu observis kaj esploris rilatojn de birdoj kaj fiŝoj. *Dyk* instruis studentojn, ke multe da senvertebruloj, ekz. moluskoj (DYK k.a. 1957, PFLEGER 1988, SACHS 1995), lumbrikoj (ZAVADIL 1953, 1955), formikoj (PÁV k.a. 1981), skaraboj (HOVORKA 1954), libeloj (FISCHER 2008), povas esti interaj gastigantoj de parazitoj kaj iksodoj kaj insektoj, kiuj suĉas sangon de bestoj, povas transmitti evoluajn stadiojn de parazitojn (**Bildoj 3-6**).



Lia granda amiko estis sovetia parazitologo *Konstantin Ivanoviĉ Skrjabin* [konstantjin] (1878 – 1972), kiu laboris pri teorio de natura fokuseco (ruse: *природная очаговость*) de parazitaj malsanoj. Dank' al V. *Dyk* tiu eminenta sovetia sciencisto fariĝis la 14-an de majo 1959 honora doktoro de bestkuracista medicino de la Bestkuracista Universitato en *Brno*.

Ekde la jaro 1955 V. *Dyk* estis profesoro kaj plenumis funkciojn de vivdekano kaj vicrektoro. En la jaro 1964

lia familio translokiĝis en domon numero 18 en *Náměstí Slovenského národního povstání* (Placo de Slovaka nacia popolleviĝo) en *Brno-Černá Pole*.

Ne nur studentoj, sed ankaŭ kunlaborantoj en katedro ŝatis lin. *Dyk* estis bonvola ekzaminanto kaj bona ĉefo. Li komencis ĉiun sian prelego pri parazitologio de iu aktualaĵo de kultura vivo, demandis nin, ĉu ni vizitas teatron aŭ scias novaĵojn de vivo de la urbo. Laŭ profesoro *Dyk* bestkuracisto devas esti progresema kiel kultura homo.

En la jaro 1970 komunistoj elstrekis *Dykon* el listo de partianoj kaj en la jaro 1972 likvidis aŭtonomion de katedro de parazitologio, kiun *Dyk* gvidis preskaŭ dudek jaroj. Katedro de parazitologio fariĝis parto de granda Katedro de patologio subgvide rektoro profesoro *Miroslav Zendulka* kaj malsanoj de fiŝoj kaj abeloj fariĝis parto de nova Katedro de malsanoj de ĉasbestoj, fiŝoj kaj abeloj subgvide docento *Jaroslav Krul*. Ambaŭ tiuj universitataj funkciuloj estis precipe „bonaj komunistoj“. Ideologoj denove venkis fakulon.



De tiu tempo V. *Dyk* havis sanajn problemojn (malsano de tiroida glando, alta sangopremo). Li neniam fariĝis korespondanto de la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj. Pragaj sciencistoj, akademianoj, neniam akceptis tiun laboreman scienciston kaj pedagogon.

Ekde la 1-an de marto 1977 V. *Dyk* estis rentulo. Katedron de parazitologio ekgvidis docento *Miroslav Nevole*, kiu ne estis parazitologo, sed patologo kaj komunisto. Ankaŭ nova asistentino *Daniela Lukešová* estis komunistino. Komunistoj tiamaniere ekregis la katedron.

Vivo de V. Dyk ŝanĝiĝis. Li havis multe da tempo, kiun dediĉis al genepoj kaj verkado. Kun sia amiko, fama botanikisto, docento *Jaromír Šikula* (1924 –2000), kiu estis ankaŭ funkciulo de Esperantista Klubo en *Brno*, li ofte konzultis ĝardenistajn problemojn. Ekde la jaro 1978 V. Dyk kunlaboris kun redakcio de fakĵurnalo *Veterinářství* (Bestkuracista medicino), kie li regule publikigis sciaĵojn kaj sugestoj de atestataj laboroj. Lia bonega observa talento manifestiĝis en multe da fakaj kaj sciencaj artikoloj, ekzemple pri lumbrikoj, kiujn li observadis en parkoj kaj ĝardenoj. Sian lastajn sciencajn artikolojn li dediĉis al margaritifero (DYK 1992, 1993).



La 5-an de novembro 1995 profesoro Dyk mortis. Li estas entombigita en arbara tombejo en *Vranov* ĉe *Brno* (CHROUST 1996).

Signifo de la profesoro Dyk estas grandega, ĉar eĉ en la 21-a jarcento parazitaj malsanoj endanĝerigas homojn ne nur en tropikaj landoj, sed ankaŭ en Eŭropo (SACHS 2001, VOLF k.a. 2007). Katedron de

parazitologio nuntempe gvidas profesoro *Břetislav Koudela* (nekomunisto), kiu kiel studento povis aŭdi lastajn prelegojn de profesoro Dyk (1976) kaj kontinuas laboron en lia stilo.

Referencoj

- DANIEL, M. (1985): *Tajné cesty smrtonošů*. 1-a eld., Prago, Mladá fronta, 264 paĝoj.
- DYK, V. (1965): Úspěchy veterinární parazitologie v letech 1945-1965. *Veterinářství*, 15: 174-176.
- DYK, V. (1992): Profilová ohrožovatelé lokalit perlorodky říční. *Erica*, 1: 21-38.
- DYK, V. (1993): Die Faktoren des Gefährungsprofils an den Standorten der Flussperlmuschel in Böhmen und Mähren. *Mainzer naturwissenschaftlicher Archiv*, 31: 307-326.
- DYK, V., KLIMEŠ, B. & ZAVADIL, R. (1957): *Cizopasníci a invazní choroby drůbeže*. 1-a eld., Prago, Státní zemědělské nakladatelství, 181 paĝoj.
- DYK, V. & ŠINDLÁŘ, J. (1972): Padesát let vědeckého sborníku Vysoké školy veterinární v Brně (1922-1972). *Acta veterinaria Brno*, 40: 323-329.
- FISCHER, O.A. (2008): Libeloj kiel interaj gastigantoj de parazitaj vermoj (trematodoj kaj cestodoj). *Scienca Revuo*, 59: 141-156.
- HOVORKA, J. (1954): *Helmintologická diagnostika. I. Laboratorna diagnostika helmintóz*. 1-a eld., Bratislava, Vydavateľstvo Slovenskej akadémie vied, 377 paĝoj.
- CHROUST, K. (1996): Prof. MVDr. Václav Dyk, DrSc. has died. *Helmintológia*, 33: 8.
- KRATOCHVÍL, J. (1972): Životní dílo prof. MVDr. Václava Dyka, DrSc. *Acta veterinaria Brno*, 40: 2-11.
- PÁV, J., KOŽUŠNÍK, Z., MATOUŠEK, Z., VANČURA, V. & ZAJÍČEK, D. (1981): *Choroby lovné zvěře*. 1-a eld., Prago, Státní zemědělské nakladatelství, 272 paĝoj.
- PFLÉGER, V. (1988): *Měkkýši*. 1-a eld., Praha, Artia, 191 paĝoj.
- SACHS, R. (1995): *Nebezpečí tropických nemocí*. 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 33 paĝoj.
- SACHS, R. (2001): *Medicina parazitologio. Helmintoj. Hompatogenaj platvermoj. Tekstaro por Sanmarinaj universitataj sesioj (SUS), fakaro 5.1 – Naturscienco*, *Scienca Revuo*, faka krompajero, 44 paĝoj.
- ŠINDLÁŘ, J. (2012): Prof. MVDr. Václav Dyk, DrSc. 1-a eld., Brno, Veterinární a farmaceutická univerzita, 90 paĝoj.
- VOLF, P., HORÁK, P., ČEPIČKA, I., FLEGR, J., LUKEŠ, J., MIKEŠ, L., SVOBODOVÁ, M., VÁVRA, J. & VOTÝPKA, J. (2007): *Paraziti a jejich biologie*. 1-a eld., Prago, Triton, 318 paĝoj.
- ZAVADIL, R. (1953): Studie o systematické příslušnosti, vývoji a pathogenitě parazitů z rodu *Syngamus* Siebold, 1836. *Sborník Vysoké školy zemědělské a lesnické fakulty*, 1-4: 101-121.
- ZAVADIL, R. (1955): Druhové znaky a rozšíření cizopasníků *Syngamus trachea* a *Syngamus (Ornithogamus) merulae*. *Československá parazitologie*, 2: 125-133.

Masklo de *Libellula depressa*. Libeloj povas esti interaj gastigantoj de cestodoj kaj trematodoj.

